



# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban, PERPIGNAN (P.O.) - Telefono 34-38-84

N° 13-a ----- RAPORTO PRI LA AGADO ----- 2-a Trimestro 1964

## MONTPELLIER

De la 3-a ĝis la 8-a de januaro, ni akceptis sinjorinon MAJOR, kiun ni jam akceptis antaŭ kelkaj jaroj. Nia angla amikino, dum la kunveno de la 6-a de januaro, parolis pri la personeco de nia majestro Zamenhof. Poste ŝi instruis kantojn kaj rakontojn. Dankon al ŝi pro tiu agrabla kunveno !

La trian de februaro okazis la ĝenerala kunveno kun elekto de la novaj estraranoj.

De novembro, Doktorino Yvette VIERNE gvidas "superan" kurson. Ĉeestas regule 6 lernantinoj kiuj progresas. Ili estas junaj (malpli ol 25 jaroj), kaj baldaŭ kun ili ni organizos apartajn kunvenojn por la gejunuloj.

La esperantista grupo de Heidelberg respondas al nia peto kaj elkore akceptas la ĝemeligon de niaj Esperantistaj grupoj (ne forgesu ke la urbo de Heidelberg estas ĝemeligita kun la urbo de Montpellier).

Ili esperas "ke niaj komunaj interrilatoj fariĝu agrablajn kaj frukdonajn ambaŭflanken".

La ĉeestantoj je la lasta kunveno respondis al niaj novaj amikoj. Alportu ideojn por plej efike konkretigi la ĝemeligon ...

Pro la printempa libertempo la aprila kunveno okazis la 13-an de aprilo je la 21-a.

Ni invitas alilandanon, hungaran aŭ germanan (Heidelberg aŭ ...) dum junio kiel kutime.

Grava informo : Dum la februara kunveno, oni decidis starigi jaran kotizon anstataŭ monatan. Laŭ tiu decido oni devas pagi :

- membro ..... 10 F
- edzino de membro, junulo(ino) malpli 20j, studento(ino) ... 5 F

Vi povas sendi vian kotizon al nia C.C.P. : Groupe Espérantiste de Montpellier, 5 rue Docteur Roux - n° 1.487.48 Montpellier. Nepre citu vian nomon sur la ĉeko!

La membroj ricevos la kunvokilojn kaj senpage la regionan bultenon (t.e. Sudfranca Stelo) kaj la jaran bultenon de la grupo.

La liceaninoj de la Esperanto-Klubo de Montpellier parolas al vi ...

"Pri mia unua Esperanta promeno":

La 29-an de septembro, kiam matene mi supreniris en la aŭtobuson de la esperantistoj, S-ro LENTAIGNE sidigis min flanke de juna germano por ke mi parolu esperante.

Mi estis kontenta pri mia unua kontakto.

Poste, antaŭ la kastelo de UZES, nia grupo renkontis du japanojn. Ili certe konis eĉ ne unu vorton de nia lingvo, kaj vere Esperanto estis la nura rimedo kiun ili povis uzi.

Dum la vizito de la mezepoka kastelo, vidante kaskon de militisto de la epoko de Jeanne d'Arc, ili kredis ke ĝi estis kaskon de Jeanne d'Arc mem ... Ili notis tion sur sia notlibreto, kaj ili estis tre fieraj. En la kapelo, la du japanoj lernis fari preĝon laŭ la eŭropa maniero.

Ekstere, kie blovis tre forta vento, ni klarigis al ili kio estas la "corrida". Ankaŭ ili demandis ĉu oni fabrikas oleon per la hipokastanaj fruktoj, kiuj ili levis de la tero !

La pikniko proksime de la "Pont du Gard" estis tre agrabla, kaj mi diris kun hezitema voĉo : "Je la nomo de la junulinoj mi salutas la grupon !"

Post tre bona posttagmeze, la aŭtobuso revenis en Montpellier. Miaj unuaj kontaktoj kun fremdaj esperantistoj tre kontentigis min.

Ariane ANGLAS.

---

### PERPIGNAN

La 14-an de januaro okazis ĉe "Collège d'Enseignement Ménager", strato Zamenhof - Perpignan, prelego pri esperanto antaŭ unu cento da lernantinoj.

Post tiu prelego, 50 lernantinoj sekvis la kurson kiu komencis la 21-an de januaro.

La interesa fakto estas ke la 3 profesoroj de la kolegio sekvas ankaŭ la kurson.

### Rapport de la 3<sup>ème</sup> Semaine Culturelle Espérantiste par les stagiaires perpignanais:

Mercredi 1<sup>er</sup> avril dans le coquet château de Grésillon (Maine-et-Loire) s'ouvrait la 3<sup>ème</sup> Semaine Culturelle Espérantiste sous le haut patronage du Commissariat à la Jeunesse et aux Sports; semaine pendant laquelle nous devons rencontrer divers étudiants de tous les coins de France ainsi que de très sympathiques étrangers. Très tôt, d'ailleurs, une franche camaraderie naissait entre tous ces nouveaux espérantistes qui faisaient leurs premières armes dans cette langue. C'est ainsi que des conférences fort à propos surent captiver l'attention des stagiaires encore néophytes dans la pratique de la langue internationale.

Les causeries furent fort bien comprises dans leur ensemble. Notons surtout les conférences des professeurs, RIBOT qui sut nous démontrer la logique de l'oeuvre de Zamenhof; ALBAULT qui prouva qu'en esperanto on pouvait traiter un sujet aussi scientifique que délicat : l'oeil. M. THIERRY, quant à lui, montra, dans son exposé sur la littérature espérantiste, l'évolution de la langue et la richesse de son expression. En outre, grâce à M. MOTILLON et à Mme CHEVERRY, tout ce qui touche à l'histoire tourangelle et angevine nous fut dévoilé. Notre Président, M. LLECH-WALTER, nous parla, pour sa part, d'une manière plaisante et instructive, de la pédagogie des cours publics. Par M. FRANGEUL, nous fûmes mis au courant des réalisations de l'UNESCO. C'est avec précision dans les mots, justesse dans la pensée, sûreté dans l'élocution, que le Professeur LAPENNA sut véritablement captiver l'auditoire. Grâce à lui nous pûmes nous faire une idée des nuances intimes de la langue; nuances insoupçonnées du profane, d'ailleurs.